# FORSTISTA INFORMILO


de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO „LEXICON SILVESTRE“ R.A.

Nr. 55 Eberswalde, 2008-11-15

---

**Karaj gemembroj de “Lexicon silvestre” r.A.,**

ekde pli ol unu jaro ni ĉiuj devas afliktite majstri la per malsano kaŭzitan foreston de d-ro Karl-Hermann Simon, kiu estis nia prezidanto de multaj jaroj. La pasinta jaro montris al ni, kiel malfacila kaj ankaŭ tempokonsuma povas esti la spertiĝo en laboro kaj aktiviĝo de la novelektita asocia estraro. Tial ni pripensis ĉion kaj decidis fari multnombrajn ŝanĝojn. Ni kreis novan statuton kaj ankaŭ novan aferan regularon (GO/AR). Per tio ni intencas forigi tiajn aferojn el la statuto, kiuj ofte tuj necesigas konformigon al la ŝanĝiĝantaj kondiĉoj. Tiel ni ŝparas kostojn, estiĝantajn fare de ĉiu ŝanĝo de la statuto kaj sekve de tio la registrigo ĉe notario/juĝejo. La enkonduko de nova afera regularo (AR) faras nin pli flekseblaj kaj ni kapablas, pli rapide reagi je ekaperantaj problemoj. Per la nova statuto ni reduktas la estraron je tri personoj kaj daŭrigas ties deĵoran periodon je kvar jaroj.


*De maldekstre: L. Blaško, S. Panka, P. Spangenberg*

Ni deziras doni tiumaniere ŝancon al la nova estraro, ke ĝi aktiviĝu post certa spertiĝo en la laboro. Unu jaro por tio estas nepre tro mallonga! Ni komprenas la tripersonan estraron kiel manaĝer-teamon, respondecanta precipe pri la organizado kaj kunordigo de l` asocia aktiva vivo. Helpe de fakaj komisionoj, nomumitaj de la estraro, oni realigu la speciajn taskojn, ekz. la lingvan laboron.

Nia maksimo estas, funkci konsiderinde kostoŝpara. Pro tio ni rezignos pri preso de lingvo-volumoj je stoko. Presado okazos nur surbaze de konkreta postulo. Plue, estonte ni ne mendos ISBN (Internacia Norma Libro-Nombro) por niaj presaĵoj – ĉio estas presata/printata en nia propra eldonejo, la debito estos realigata trans nia Web-prezentado.
Ni konstante klopodos pri konsiderinda malfermo al la publika forumo. La unuopaj lingvo-volumoj provizitaj per indiko pri aŭtoraj rajtoj proksimatempe estos disponataj al la monda publiko forme de PDF-datenoj. Tiel ni esperas minimumigi grandskale la presado- kaj ekspedokostojn, kiuj estis ĝis nun preskaŭ ne kovreblaj. Same ni esperas konigi la verkon “Lexicon silvestre” en plej mallonga tempo vaste trans la landajn limojn.
La estonta laborado pri la leksikono efektiviĝu forme de sin memdirekta projekto simila al Wikipedia. Tio esperigas nin doni al la leksikono mondskalan “vervon”. La nuntempaj prepar-laboroj realigu tiun altan celon tre baldaŭ.
Karaj geanoj, per via pledo por ĉiuj niaj multnombraj proponoj vi esprimas vian konfidon al ni. Por tio ni ŝatas danki tre kore, kaj ni certigas vin, fari ĉion – en nia forto estantan – por kontentigi vian konfidon.

Kun afablaj salutoj

nome de l`asocia estraro
Stefan Panka

## Membrokunveno

de Patrona Asocia “Lexicon silvestre” r.A.
je 2008-10-17, 16-a horo
en la domo de Forstbotanika Ĝardeno,
Eberswalde, Schwappachweg

**Tagordo:**

1. Malfermo kaj bonvenigo
2. Konstato pri la laŭregula invito, konstato pri la decidorajto
3. Interkonsiliĝo kaj voĉdonado pri la tagordo
4. Novaj gemembroj, eksiĝoj, aktuala nombro de gemembroj
5. Raporto de l`asocia estraro – bilanca raporto (estrara raporto pri la pasinta laboro)
6. Financa raporto (d-ro Weckwerth)
7. Raporto de la kasreviziorino
8. Senŝarĝigo de la estraro
9. Perspektivoj pri la laboro je “Lexicon silvestre”
10. Diskuto kaj voĉdonado pri la nova statuto
11. Diskuto kaj voĉdonado pri la nova afera regularo de l`asocio
12. Elekto de la nova asocia estraro kaj de la kasrevizioro
13. Decido pri l`akcepto aŭ malakcepto de ekzistaj deklaroj pri membriĝo, kaj prezentitaj deklaroj pri membriĝo
14. Kromaj aferoj

Aldonaĵoj:
1. Bilanca raporto
2. Financa raporto
3. Raporto de la kasreviziorino, s-ino Seeger
4. Statuto “Lexicon silvestre” r.A.
5. Asocia afera regularo

ad 1.: Bonvenigo fare de la prezidanto de l` asocio, s-ro d-ro B. Götz

ad 2.: D-ro Götz konstatas la laŭordan inviton. La gemembroj ricevis ĝustatempe la inviton kaj aldonajn dokumentojn. La prezidanto konstatas la ĉeeston de 8 gemembroj kaj sekve de tio la decidorajto.
**Ĉeestas:** Lubomir Blaško, d-ro Bernhard Götz, Clivia Panka, Stefan Panka, Jürgen Peters, Marianne Reimann, d-ro Karl-Hermann Simon, Peter Spangenberg.
Gemembroj, kiuj sin senkulpigis estas sciigitaj. Kiel gasto s-in Simon ĉeestas.

ad 3.: S-ro d-ro Götz prezentas la tagordon kaj elpetas pliajn proponojn. Poste oni voĉdonas pri la tagordo.
**Rezulto:** 8 aproboj

ad 4.: Du eksiĝoj 2008: s-ino Ingeborg Morgenstern, s-ro Jürgen Schleif; aktuala nombro de la membraro: 42

ad 5.: S-ro d-ro Götz prezentas la bilancan raporton.

ad 6.: La financa raporto, farita de d-ro Weckwerth, estas voĉlegita.

ad 7.: La skribaĵo de la kasreviziorino, s-ino Seeger, estas voĉlegita fare de d-ro Götz; senŝarĝigo de la estraro estas rekomendita.

ad 8.: Okazas ĉiuvoĉa senŝarĝigo de la estraro.

ad 9.: Stefan Panka eksplikas la koncepton pri nova Internet-prezentiĝo de l`asocio kaj skizas la estontajn eblecojn pri la labormaniero de la estraro kaj de l`asocio, kiuj rezultus el apliko de nova Web-prezentiĝo. Li proponas solvojn pri la ekzistantaj problemoj.
S-ro Peter Spangenberg klarigas la pluan laboron je „Lexicon silvestre“. Tiu laboro okazu future en formo, sin orientanta al Wikipedia. Li atendas de tio pli rapidan progreson rilate al la prilaborado de la unuopaj lingvoversiaj volumoj, kaj li proponas ampleksan malfermon de l`asocio al la publika forumo. La ĝisnunaj datenoprovizoj oni disponu al la monda plubliko – sub gardo de l`aŭtoraj rajtoj – forme de unulingvaj volumoj kiel PDF-datenoj sur nia Homepage.
S-ro Jürgen Peters proponas formuli alvokon pri (mon)donaco sur niaj Web-paĝoj.

ad 10.: Ĉiuvoĉa akcepto post malgrava ŝanĝo (ĝia tuja enmeto en la statuton).

ad 11. : Ĉiuvoĉa akcepto laŭ aliformigo de paragrafo 3.3 (Propono de s-ino Vera Blanke) kaj substituto de la formulado “aktivaj membroj” per “membroj”.

ad 12.: Ĉiuvoĉa elekto de la asocia estraro kaj de la kasrevizioro:
**Nova asocia estraro:** Peter Spangenberg kiel kvestoro (trezoristo), Lubomir Blaško kiel vicprezidanto, Stefan Panka kiel prezidanto.
**Kasrevizioro:** d-ro Bernhard Götz
Estas dirite dankon al la antaŭaj geestraranoj s-ino Clivia Panka, d-ro Horst Weckwerth kaj d-ro Bernhard Götz pro ilia laboro. Dankon ankaŭ al la kasreviziorino s-ino Seeger pro la ĝisnuna multefika kunlaboro.

ad 13.: Estas ne traktite pro ne-ekzisto de novaj deklaroj pri membriĝo.

ad 14.: Ĉiuvoĉa decido pri la ekkonekto de la nova Web-paĝo de l`asocio: www.lexicon-silvestre.de.
Ĉiuvoĉa decido pri la disponebligo de la unuopaj lingvo-volumoj forme de PDF-datenoj sub aldono de konforma indiko pri l`aŭtoraj rajtoj en nia nova Internet-vitrino. La estraro kreos konforman indikon pri l`aŭtoraj rajtoj.
Regulintervale okazu sekurigo de datenoj de la tuta dateno-stoko de “Lexicon silvestre”. Direktivo pri tio estu ellaborata tre baldaŭ fare de l`asocia estraro.
S-ino Reimann prezentas la problemojn pri la laboro de per ŝi kaj d-ro Weckwerth gvidataj MAE- kunlaborantoj. Antaŭ nelonge la laboroficejo asignis al l` asocio du freŝajn MAE- kunlaborantojn. Ĉirilata labormaniero kaj kompetencoj oni akordigis.

S-ro Panka dankas ĉiujn geĉeestantojn pro ilia kunlaboro kaj simpatio. Li finas la membrokunvenon ĉirkaŭ 18.15 horo.

Eberswalde, 2008-10-17

## Patrona Asocio “Lexicon silvestre” r.A.
## Bilanca raporto 2008

D-ro Bernhard Götz

– Dum la lasta ĉefa kunveno je 2007-10-26 estis balotata nova asocia estraro pro sanecaj problemoj de la ĝisnuna prezidanto d-ro Simon kaj ties eksiĝo el la aktiva estraro. La nova estraro konsistas kiel antaŭe el 5 gemembroj: Clivia Panka, Lubomir Blaško, Peter Spangenberg, Horst Weckwerth, Bernhard Götz. Karl-Hermann Simon fariĝas honora membro de la estraro. La ŝanĝo en la estraro estas notarie dokumentita, la ŝanĝoj estas sciigitaj al la ŝparbanko. La estraro 5-oble kunsidis dum

la pasinta jaro (9.11.07, 7.12.07, 7.3.08, 8.9.08, 3.10.08). Oni povas noti la sekvajn aktivajn faradojn:

– Trarigardo de la tuta dokumentaro de l`asocio kunvene ĉe d-ro Simon

– Decido , transpreni tiun dokumentaron kiel sekvas: translokado de la printitaj/presitaj kaj ceteraj skribaj dokumentoj/aktoj en la novan arkivejon en la Schwappachweg. Tiu ĉi estas disponata senkoste. Translokado de la printitaj/presitaj volumoj de "Lexicon silvestre" al familio Panka por plua uzado/fordono/vendo. Trarigardo kaj sekurigo de la diĝitaj Ls-datenoj, ekzistantaj sur diversaj komunikadaj rimedoj (PC, Notebook, CD, disketoj). Inventarado de ekzistantaj printitaj/presitaj volumoj okazis. La ekzistantaj datenoj estos inventarataj ĝis jarfino.

– Interkonsento pri la esenco, celoj kaj plua laborado je "Lexicon silvestre":
  - estas celo, alirebligi la ekzistantajn volumojn al pli vasta publiko. Tio okazu prefere per diĝitaj komunikadaj rimedoj. Laŭ bezono/informpeto/mendo la farado de presitaj libroj eblas.Tio okazos malgrandserie ĉe la PS-eldonejo. Prioritata celo estas, vendi jam presitajn librojn. Sed tio pli kaj pli malfacilas.
  - Por prezentado de "Lexicon silvestre" helpe de diĝitaj komunikadaj rimedoj estis diskutataj diversaj ebloj. Tiuj ĉi ampleksas la produktadon kaj disvastiĝon de "Lexicon silvestre" sur CD/DVD ĝis ĝia libera prezentado en Internet, ekz. helpe de Wikimedia (pliaj informoj per P. Spangenberg).

– Aktuala stato de la prilaborado: en la laborgruppo de Klaus-Peter Weidner la ekzistantaj paradoksaj datenoj nuntempe estas transigataj en facilan datenbanko-sistemon (Access). Ĉe tio okazas kontrolo de datenoj. La kontrolitaj Access-dosieroj estas transigeblaj laŭ bezono en aliajn programojn. Aktuale alcelita minimuma varianto estas la publikigo kaj utiligo de la datenoj sur la Server de Faka Altlernejo Eberswalde (FHE).

– Pluaj laboradoj je "Lexicon silvestre": per la ĉeso de la aktiva laboro de d-ro Simon je la leksikono pluraj komencitaj laboroj (10a parto germana, 9a parto Esperanto k. a.) ne plu estas daŭrigitaj, ĉar lia kunlaboro nepre estintus necesa. La krude tradukitaj difinoj de la angla, 3a parto, kiuj jam iam estis prilaboritaj de d-ro Weckwerth, estas reviziitaj de s-in Reimann ( kaj 2008 finpretigitaj).

– MAE-aranĝo: de januaro ĝis aprilo 2007 s-ro Stoffel kaj s-ino Kneifel – asignitaj de la laboroficejo en majo 2006 – estis okupitaj laŭ intertrakto kun la Job-Center (laboroficejo) en la buroo Schicklerstrato, Faka Altlernejo Eberswalde. De junio ĝis jarfino (kaj poste kun kuranta tempo de unu jaro) estis okupitaj du plia personoj, s-ino Höhndorf kaj s-ro Palm, ambaŭ same je MAE-job. Ekde 2008-08-16 la laboro estas daŭrigata per MAE-laborfortoj (1 Euro-laboruloj). Daŭro de l`aranĝo: 1 jaro. Labortempo: 30 horoj/semajno. Du partoprenantoj (s-ino Sylvia Zucht, s-ro Ingo Krabs) ekde 9.9. eksiĝis. S-ino Reimann, s-ro Weidner kaj s-ro d-ro Weckwerth gvidas la gekunlaborantojn de tiu ĉi aranĝo. Ili okupiĝas pri diĝitizado de antaŭaj korespondaĵoj/publikaĵoj kaj pri enigo de datenoj. La laborĉambro estas senkoste disponata de Alta Faklernejo. Plie ĝi permesas la senkostan uzadon de Internet kaj telefono. La parteprenantoj de l`aranĝo ricevas de la laboroficejo 1,1 Euron/horo por siaj elspezoj. Por la patronado de MAE-aranĝo l`asocio ricevas 60 Euron/monato.

– Instalo de nova Homepage fare de Stefan Panka: www.lexicon-silvestre.de. Tiu ĉi Homepage estas disponata senkoste de la Interpretista Buroo Clivia Panka je ŝia kampo (sfero) de la Strato-Server. La ekkonekto okazos post aprobo de la membro-kunveno. La ĝisnuna adreso www.lexicon-silv.de kun ĉiuj kontakt-datenoj estos nuligata proksimatempe ĉe Strato.

- Venditaj kaj presitaj libroj de l`asocio: Oktobre 2007 estis vendataj 15 volumoj de diversaj lingvoj al s-ro Blanke kaj en novembro pliaj 8 volumoj de “Lexicon silvestre” (diversaj lingvoj) ankaŭ al s.ro Blanke. Plue estis finpretigata la unua parto polalingve je 13 ekzempleroj, presitaj kaj binditaj, 10 ekzemplerojn oni sendis al polaj kunlaborantoj.

- Financoj: La prizorgadon de la financoj okazis plue fare de d-ro Weckwerth. La jarfina bilanco okazis ĝis la fiksita dato, la dokumentoj estis transdonitaj al la kasreviziorino, s-ino Seeger. Ŝi faris la impost-prilaboradon kaj transdonis la impostodeklaron al la financoficejo (2008) (same kiel estis farita la impost-prilaborado de la jaro 2006 en la jaro 2007 kaj la impostodeklaro estis transdonita 2007 al la finacoficejo).

Eberswalde, 2008-10-17

*Tradukanto: Ingward Ullrich, Hildburghausen*

## IMPRESSUM


| **Herausgeber:** | **Redakteur:** |
|---|---|
| Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V.<br>Fachhochschule Eberswalde<br>Dr. Bernhard Götz<br>Am Zainhammer 5<br>D-16225 Eberswalde<br>Tel.: +49-3334-65 563<br>Fax: +49-3334-65 567<br>Email: kontakt@lexicon-silvestre.de<br>www.lexicon-silvestre.de | Stefan Panka<br>Joachimsthaler Str. 15a<br>D-16230 Britz<br>Email: s.panka@lexicon-silvestre.de |